

La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William Peace

sabaton, la 2-an de Julio, 2016 • numero kvin

Silento

*Kia estas la koloro
de ĉi malkvieta animo?
La okuloj rikoltas
la purpuran silenton
de l' violoj,
kiuj sonĝas surfenestre.*

*Sed la urbo ekstere
voras hastemajn bruojn.
Kaj la dimanĉo aŭtuna
svenas en sonoj el pluvo.*

*Tiam la penso dancas
en ventego brua...
Nur muziko, preludo,
eble de Bach aŭ Vila-Lobos, mian
menson babileman silentigos.*

Sentitola

*Travivi
Esperantujon
Estas ĝui
Neimageblan
Amaferon.
(Poemoj de Maria Nazaré LAROCA)*

Percepto

*Minuskla grajno el lumo
en la polvo de l' tempo,
mi eniris en la sinon de l' Vivo
kun ununura bagaĝo:*

*la senfina libereco
konstrui mian destinton.*

*Kaj mi formanĝis jarmilojn
per armiloj de nescio
kaj malsaĝeco.*

*Hodiaŭ tamen
mi kultivas revojn kaj versojn
en la sekreta oceano,
kiu loĝas en la ĝardeno
ene de mi.
Mia vojaĝo senfinas...*

Kio okazos hodiaŭ?

- ★ 7:30 – 8:15 atm
Matenmanĝo
Belk Dining Hall
- ★ 8:30 – 12:15 ptm
Lecionoj
Flowe
- ★ 12:30 – 1:15 ptm
Tagmanĝo
Belk Dining Hall
- ★ 2:00 – 3:15 ptm
KTF: metiejo pri projekto-planado
Flowe
- ★ 3:15 – 4:00 ptm
Tim MORLEY pri kelkaj
strangaĵoj de la angla lingvo
Flowe
- ★ 5:45 – 6:30 ptm
Vespermanĝo
Belk Dining Hall
- ★ 7:00 – 8:00 ptm
kristana diservo kun
Hanso BECKLIN en Flowe
- ★ 8:00 – 9:00 ptm
KTF: kiel starigi Youtube-kanalon
Flowe



*La tuta kalendaro troviĝas
sur blanka tabulo en la
unua etaĝo de nia dormejo.*



La NASKa Fasko estas forumo por ekzerci vin en verkado kaj dividi viajn verkojn kun aliaj lernantoj. Sendu kontribuadojn (artikolojn, poemojn, ŝercojn, bildstriojn, plendojn, amleterojn, ktp.) al la redaktoro en ĉambro 112, aŭ (eĉ pli bone) sendu ilin al nask.esperanto@gmail.com.

Kaj... se vi estas en la supera kurso, bonvolu volontuli por helpi lernantojn en aliaj niveloj verki aŭ poluri siajn verkojn.

Feliĉa hazardo

de Jan LONG

Antaŭ multo da jaroj, mi kaj mia 8-jaraĝa filo travagis Jugoslavujon kaj haltis ĉe Ljubljano. Dum ni marŝis tra la urbaj stratoj, la rimeno de mia sandalo rompiĝis.

Baldaŭ mi rimarkis ŝildon kun bildo de rompita ŝuo. Mi eniris la metiejon de ŝu-riparisto kaj mi atentigis lin pri mia sandalo. Sen vortoj, li foriris malantaŭen. Dume, mi rimarkis sur la muro Ruĝ-Ĉinujan Esperanto-kalendaron.

Kiam li revenis, mi parolis Esperante. Li ne surpriziĝis, kaj iris malantaŭen por finaj retuŝoj. Li revenis kun miaj riparitaj sandaloj kaj parolis la serbokroatan lingvon. Mi respondis, ke mi ne komprenas, kaj ke ni estas usonanoj. Li preskaŭ

Ni kuru matene!

Ĉu vi estas kuristo? Ni kuru kune! Renkontiĝu ĉe nia dormejo (Finley) ĉiumatene je la sesa kaj tridek por kuri ĉirkaŭ la kampuso de WPU. Mi esperas vidi vin tie!

Demandoj:

- *Kiom rapide vi kuros?*
Je ĉirkaŭ po ses mejloj hore. (Malpli rapide komence, pli rapide poste.)
- *Kio okazos, se pluvos?*
Ni malsekiĝos.
- *Kio okazos, se fulmotundros?*
Vi diru al mi, ĉar mi ne estos tie!

— Greĉjo FORĜISTO



Jen trilingva ŝildo sur muro en Telavivo, Israelo. Geamikoj niaj ĵus fotos ĝin tie. “Rehov” signifas “strato”. Sub la hebrea nomo de la strato troviĝas hebreaj vortoj kiuj signifas: “kreanto de la internacia lingvo Esperanto” Poste tekstas la nomo de la strato en la araba, kaj fine en la angla. — Margo KEVESH-COHEN

svenis sur la plankon. Li neniam renkontis iun ajn personon, kiu ne estas jugoslavujano. Li fermis sian metiejon kaj ni iris al loka restoracio.

Ni estis samaĝuloj, do ni komparis niajn vivojn: la mia estis feliĉa kaj facila; la lia okazis sub Nazioj kaj komunistoj. Ni restis tie tri horojn. Tiu sperto estis inter la plej mirindaj okazaĵoj de mia Esperanta vivo.

Kvizaj respondoj

de Derek ROFF

- 1) En 1880, la grava scienca revuo *Science* unue eldoniĝis.
- 2) Pri la orikteropo, jen la ordo de la tri rilataj aferoj: en la reta *Plena Ilustrita Vortaro*, aperas kvin adjektivoj en la difino de “orikteropo”. Ekzistas nur kvar ne-insulaj landoj en Afriko, kie la orikteropo ne nature vivas: Maroko, Alĝerio, Tunizio, kaj Libio. Kaj malgraŭ la fakto ke la

orikteropo ja troviĝas en kvardek kvar landoj, ekzistas nur unu specio entute, kiu nun vivas sur la tero.

...kaj nova kvizo

Abraham LINCOLN estis la unua membro de sia partio gajni la prezidantecon de Usono, kiam li elektiĝis en 1860. Sed ekde tiam, tiu partio estis tre sukcesa. Entute nur du kandidatoj de alia partio gajnis tiun postenon ekde Lincoln, ĝis 1932. Unu el tiuj du regis dum la jaro, kiam Esperanto aperis. Kiel nomiĝas tiu partio? Kaj kiuj estis la du prezidantoj de la alia partio?

Jen listo de la prezidantoj post Lincoln: Andrew JOHNSON, Ulysses GRANT, Rutherford HAYES, James GARFIELD, Chester ARTHUR, Grover CLEVELAND, Benjamin HARRISON, Grover CLEVELAND, William MCKINLEY, Theodore ROOSEVELT, William TAFT, Woodrow WILSON, Warren HARDING, kaj Calvin COOLIDGE.